



Esperanto *en Danio*

25-a jarkolekto • n-ro 1 • februaro 2018



En oficialaj rilatoj
kun UN kaj Unesko

Internacia
TAGO de
la GEPATRA
LINGVO

21a de februaro 2018



Uzante la internacian lingvon, **Esperanto**,
ni respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturalan
diversecon en la mondo.

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la prezidanto:

Peter Wraae

Eremitageparken 17 st, C

2800 Lyngby

☎ 60 70 79 69 peter@wraae.dk

Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88 386

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Finn Østerbæk (kasisto)

Ileana Schrøder (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Arne Casper

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45

finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

17.04.2018

Enhavo

[Skandinava Kongreso 2018.....3](#)

[Pri gazetoj kaj libroj.....5](#)

[Aarhus.....8](#)

[Kopenhago.....9](#)

[Vizitrekordo ĉe la Esperanto-
muzeo en Vieno.....10](#)

[Tago de la gepatra lingvo.....12](#)

[La “sekreta malvirto” de Tolkien
15](#)

[Raporto el Japanio.....17](#)

[Eventoplena jaro.....22](#)

[Saussure-a jubileo.....26](#)

Skandinava Kongreso 2018

Okaze de la centjariĝo de la Unua Skandinava Kongreso en Gotenburgo, Dana Esperanto-Asocio, Sveda Esperanto-Federacio kaj Norvega Esperantista Ligo organizas komunan kongreson en la DFDS-pramo inter Kopenhago kaj Oslo inter la 10-a kaj 13-a de Majo 2018.

En Oslo estos vizito en la urbodomo, kaj en Kopenhago oni povas elekti inter du ekskursoj kun Esperanto-historia temo. En la ŝipo mem estos jubilea programo kaj ankaŭ aparta junulara kunveno.

Resumo de la programo

Ĵaŭde la 10-an de Majo:

13.45 Enskribiĝo en la terminalo de DFDS

14.00-17.00 Ĝeneralkunveno de DEA en la konferenca centro, etaĝo 11.

17.45-19.30 Tri-plada menuo en *Restaurant Blue Ribbon* (trinkaĵoj ne inkluzivitaj). Poste libera babilado en iu el la kafejoj, trinkejoj, restoracioj, noktoklubo aŭ kazino.

Vendrede la 11-an de Majo:

7.00-9.45 Matenmanĝa bufedo en restaŭrant 7 Seas.

10.00-13.00 Ekskurso en Oslo.

14.00-17.00 Jubilea programo en la konferenca centro enŝipe.

16.30-19.30 Jarkunveno de SEF en la konferenca centro.

20.30 Vespermanĝa bufedo en Restaŭrant 7 Seas. Abunda bufedo por ĉiuj gustoj, inkluzive 1 trinkaĵon (bieron/vinon/akvon). Aldonaj trinkaĵoj estas aĉeteblaj.

Sabate la 12-an de Majo:

07.00-09.45 Matenmanĝa bufedo en restaurant 7 Seas

09.45 Alveno al Kopenhago, forlaso de la ŝipo

10.00-15.00 Ekskursoj en Kopenhago. (Je la 16:00h la ŝipo forveturos kun la hejmenvojaĝantaj Norvegoj kaj nord-Svedoj).



Afiŝo de la unua SEK



La kongresejo de nia ĉi-jara jarkunveno

Pliajn detalojn kaj aliĝilon vi trovos rete ĉe la adreso:

<http://esperantonordio.org>

(En la Sveda, Esperanta kaj – nekomplete – la Dana).

La kotizo estas 1 970 danaj kronoj kaj inkluzivas la vojaĝon tien kaj reen, tranoktadon en dupersona kajuto, rezervon de kunvenĉambroj, matenmanĝon kaj vespermanĝon. Dum la kunvenoj freŝaj fruktoj, manĝetoj, kafo, teo kaj akvo estos je nia dispono. Por pliaj 760 kronoj oni rajtas unupersonan kajuton. Kalkulu kun iom da pliaj elspezoj por la ekskursoj (precipe tagmanĝo).

La organizantoj nun ŝvite laboras por fari el la kongreso agrablan kaj memorindan eventon. La prezo eble estas iom pli alta ol en aliaj jaroj, sed tia sama estas la nivelo de komforto. Utiligu la okazon partopreni en unika kongreso, esplori Oslon kaj renkonti la najbarojn!

Notu:

- ***Vi devas kunporti vian pasporton aŭ stirpermesilon.***
- ***Eblas aliĝi ĝis la 31-a de Marto, pagante al la konto 8411-4188386 (Fælleskassen).***

Pri gazetoj kaj libroj

La kroniko kiun nia prezidanto sukcesis aperigi en Politiken, daŭre havas efikon. En Decembro en du Jutlandaj kaj multaj Selandaj lokaj gazetoj aperis longa artikolo, kiu prezentas la eldirojn de Peter Wraae kun kontraŭkomentoj – ne ĝustaj, sed nek stultaj nek malafablaj – de socilingvistino Marie Mae-gaard. En *Nordvestnyt* (Slando) aperis ankaŭ letero de leganto Erik Olesen, kiu atentigas ke la unua dana Esperantoklubo estis fondita en Nykøbing Sjælland en 1897.

Alia kuraĝigo estas la nuntempe ĉiam pli multaj ekzemploj ke neEsperantistoj prenas Esperanton serioze. En Januaro aperis ĉe la Brita eldonejo *Multilingual Matters* nova libro de Karen Risager, emerita profesorino de la Universitato de Roskilde. Ĝi estas titolita *Representations of the World in Language Textbooks* (Mondoprezentoj en lingvolernolibroj). La aŭtoro tie analizas lernolibrojn de la Angla, Germana, Franca, Hispana kaj Dana lingvoj – kaj de Esperanto (pli specife *Vojaĝo en Esperantolando* de Boris Kolker). Se juĝi laŭ la reklamteksto de la eldonejo, la konkludo estas ke en ĉiuj el ili la Afrika kontinento estas malsufiĉe reprezentita.

Eble la kroniko de Peter Wraae ankaŭ spronis la semajnan gazeton *Weekendavisen*, kiu la 19-an de Januaro en sia konstanta etimologia kolumno donis klarigon pri la vorto “volapyk”. La artikoleto resumas la planlingvan historion de la lastaj 150 jaroj, kaj sekve temas unuavice pri Esperanto. Bedaŭrinde la aŭtoro taksis la nombron de Esperantistoj je nura “duo da miloj”, pli-malpli la averaĝa nombro de partoprenantoj en Universala Kongreso. (La artikolo, kiun vi nun legas, estas bazita sur mia reago al *Weekendavisen*, kiu aperigis ĝin du semajnojn poste.)

Tamen, la 19-an de Januaro estis en *Weekendavisen* ankaŭ multe pli interesa artikolo en la literatura sekcio. Tie Kathrine Tscherminsky, ne menciante Esperanton aŭ eĉ aludante al ĝi, liveras perfektan ekzemplon de tiu tutmonda lingva malegaleco kiu ne estas venkebla krom per tutmonda agnosko de la Internacia Lingvo. Ŝia artikolo temas pri la skandaleto en kiun implikiĝis la Brita *Booker*-premia fonduso en 2016, kiam ĝi premiis nekompetentan Anglan tradukon de romano de la Korea aŭtorino Han Kang. Legante tiun artikolon, mi ekpensis: Ĉu io simila povus okazi en mondo kie Esperanto estus ĝenerale sciata?

La Booker-premio estis unuafaje atribuita en 1969. Ĝi iĝis tiel prestiĝa ke libro normale plibonigas siajn vendojn jam se ĝi nur troviĝas en la listo de

proponataj premioj. Ĝis 2005 oni premiis nur Anglalingvajn aŭtorojn, sed ekde tiu jaro ekzistas paralela “internacia” premio por tradukoj en la Anglan. Bele ja estas ke oni fine komencas elstarigi la gravan rolon de la tradukisto, sed ĉu tio vere estu ekzemplo de tutmondiĝo triumfanta? Laŭ Esperantista vidpunkto la establo de la nova premio estas nur ŝanceliĝanta paŝeto en la ĝustan direkton, neniom sufiĉa en si mem, kaj la skandaletto pri la romano de Han Kang montras tion.



Winner

The Man Booker International Prize 2016 

La romano, la aŭtoro, la tradukinto Deborah Smith kaj la premio.

Aŭtoro kaj tradukinto ricevas po duonon de la premi-sumo [<http://bookslive.co.za>].

En tia mondo kian ni alstrebas, Korea eldonejo normale elektus aperigi novan romanon de elstara aŭtoro samtempe en la Korea lingvo kaj en la Internacia. La tradukon al Esperanto prizorgus denaska Kore-lingvulo, eventuale la aŭtoro mem. La kvaliton de la traduko prikomentus granda nombro da recenzoj, kiujn povus legi ankaŭ neKoreoj. Tradukoj al pliaj lingvoj do povus apogiĝi sur du versioj de la teksto, anstataŭ nur unu.

Precipe se la aŭtoro aŭ ties gepatroj estus enmigrintoj, la originala lingvo de la romano ankaŭ povus esti Esperanto. Nia originala literaturo jam estas konsiderinda (multe pli konsiderinda ol Marie Maegaard ŝajnas supozi), kaj Esperanto jam foje funkciis kiel punta lingvo por beletra traduko inter malgrandaj lingvoj – oni notu ke la Dana versio de la premiita romano de Han Kang estas tradukita el la Angla! Ankaŭ okazas ke renomaj eldonejoj aperigas originale Esperantajn verkojn en nacilingva traduko. Lastatempa rimarkinda ekzemplo de tio estas la du-voluma prihistoria verko *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins, tradukita de Humphrey Tonkin en la Anglan. Ekzistas pli fruaj eldonoj de tiu verko en la Germana kaj Rusa.

Se oni entute kredas la finan venkon, ĝi kompreneble ne estas baldaŭa. La mondo ne estas matura por tio, kaj ni mem ankaŭ ne. Sed ĉu ne unu elemento de nia nematureco povus esti manko de vizioj pri la estonta monda literatur-eldona pejzaĝo? La beletro ne malaperos, ĉu el la naciaj kulturoj, ĉu el la internacia, kaj tion ni Esperantistoj kredeble finfine ekkomprenis. Sed ankoraŭ ne disvastiĝis inter ni la kompreno ke nia kulturo devas esti *bufrokulturo*, kapabla samtempe fari la hejman kulturon malpli limiga kaj ĉiujn ceterajn malpli timigaj.

En postfinvenka mondo la homoj tute libervole daŭrigos la lokajn kulturojn, kvankam la internacia estos disponebla kaj ili partoprenos ankaŭ en ĝi. Kiuj uzos kiom da tempo en kiaspeca kulturo, kaj kiel interŝanĝiĝos aŭ kontrastiĝos lokaj kaj mondaj kultureroj, kompreneble estos treege diverse. Sed tra la tuta evoluo Esperanto rolos samtempe kiel perilo kaj barilo inter la lokaj kulturoj – alivorte kiel bufro. Ĝi estas la sola kiu *povos* roli tiel, se la monda kultura vivo estu organizita ne hierarkie, sed demokratie.

En mondo kie Esperanto ne ekzistas – kaj ni ne forgesu ke la plimulto de homoj ankoraŭ vivas en tiu mondo – vere demokratia monda kulturo simple ne estas imagebla. Tie la establo de la “internacia” Booker-premio jam estas pinto de demokratiigo. Sed eĉ kie Esperanto jam ekzistas, ankaŭ tie oni apenaŭ *kuraĝas* imagi la demokratian kulturon, kvankam tio estas farebla per minimumo da fantazio. Jen ankaŭ kial la grupeto pompe nomita “la Esperanta Civito” povis ekhavi tiel eksterproportcian influon ene de nia nuna literatura pejzaĝeto. La Civito provas levi la Esperantan kulturon al io memstara, ne bufra. Tio ne estas la ĝusta respondo al la defioj, sed en la ĉeefluo de la Movado la defioj estas simple ignorataj. La malĝusta respondo de la Civito do estas ĝia merito, ne malmerito!

Fine eble ne superfluas substreki ke la misatribuo de la Booker-premio estas nur malgranda skandalo. Kvankam la traduko de la romano de Han Kang estas tre malpreciza, ĝi estas fidele al la ĝenerala enhavo de la teksto. Ĝi estas pli libera ol oni ŝatas ĉe romanoj, sed finfine temas pri beletro, ne pri la sekurproceduroj de atomcentralo. Fine ne malplej gravas ke Han Kang mem povas legi la Anglan kaj aprobas la tradukon (eble parte ĉar supozeblas ke pli trafa traduko malpli facile trafus la premion!). La vera skandalo estas ke *povis*, eĉ iam *devis* okazi ĉi tia misatribuo; ke ĝi *efektive* okazis, estas relative bagatele.

Jens S. Larsen

Aarhus

Kunvenoj okazas en Folkestedet, Carl Blochs Gade 28, 1^a etaĝo, salono 7, je h 19.30, la lastan ĵaŭdon de la monato.

Kontaktulo: Mia Nordentoft, mia@miestasmia.com aŭ 20 98 92 63.

23. Februaro: Kion vi atendas de la nova jaro 2018? Interalie: Kio okazu en AEF? Poste: Mia prezentas recenzojn de la libroj *Mondo de travivaĵoj* de Tibor Sekelj kaj *La infana raso* de William Auld.
23. Marto: La plezuro de skiado en la Francaj Alpoj. Erik kaj Grethe rakontas. Poste: Svend gvidas ludojn en Esperanto.
20. Aprilo: Lingvo kaj Kulturo en Houlkær (ĉe Viborg). Marie kaj Bodil rakontas. Poste: Ni ekzercas Esperanton en grupetoj diversnivele.
25. Majo: Raporto de la jarkunveno de DEA, kiu ĉi-jare okazos kiel parto de Skandinava kongreso 10.-13.5.2018. Poste: Mia montros Esperanto-eron de distrocela televida programo de DR, dissendota en Aprilo. Se restas tempo: Esperanto-ekzercado en grupetoj, ludoj en Esperanto aŭ iu alia aktiveco.
16. Junio: Somera ekskurso al Aalborg.

Kopenhago

Kunvenoj okazas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, ĉiulunde je la 19.00 horo en la ĉambro B. Eniru tra la malantaŭa enirejo ĉe la parkejo. Premu la butonon en la dekstra muro por malfermi la pordon aŭ voku 20 27 08 39 aŭ 60 70 79 69.

5. februaro: *Vikipedio*. Ni daŭrigas la projekton/programeron kaj ĉiuj estas ege bonvenaj partopreni *ĉu aktive ĉu pasive*.

12. februaro: *BONA ESPERO* (esperanta infanejo en Brazilo). Ni spektos filmon de Roman Dobrzynski. Erik Mortensen (kaj eble aliaj) kiu vizitis la lokon rakontos pri sia travivaĵo.

19. februaro: *Babila Vespero*. Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi.

26. februaro: *Studgrupo*.

5. marto: *Vikipedio*. same kiel la 5-an de Februaro.

12. marto: *Psikologiaj reagoj al Esperanto*, artikolo de Claude Piron. Ni legas iom de la artikolo kaj diskutas pri la temo.

Klaku:

<http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/reagoj.htm>.

La artikolo ankaŭ estas legebla en la angla ĉe:

<http://claudepiron.free.fr/articlesenanglais/reactions.htm>.

19. marto: *Babila Vespero*.

26. marto: *Studgrupo*.

2. aprilo: *Pro Pasko ne estas programo*.

9. aprilo: *Vikipedio*: same kiel la 5-an de Marto.

16. aprilo: *Frederik Dreier* (1827-1853). Jens Stengaard Larsen prelegas pri la unua socialisto de Danio. Lia teorio akcentis ne nur internaciismon, sed ankaŭ (same kiel multaj teoriuloj antaŭ Marx) la demandon de universala lingvo.

23. aprilo: *Studgrupo*.

30. aprilo: *Tio estas mia (esperanta) vivo*. Erik Mortensen rakontas pri sia longa Esperanto-vivo. Jan Niemann kompletigas kun siaj travivaĵoj, precipe tiuj kiujn ili havis kune en fervojista rilato.

7. majo: *Vikipedio*. same kiel la 9-an de Aprilo.

Vizitrekordo ĉe la Esperanto-muzeo en Vieno

– La Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko pasintjare havis pli ol 20.000 vizitantojn. Tio estas rekordo por la muzeo, kiu estis fondita antaŭ 90 jaroj, rakontas la estro de la muzeo, Bernhard Tuidler.

La Esperanto-muzeo situas en la centro de Vieno, unu el la plej grandaj urboj en Eŭropo. Tial ĝi estas rimarkata de multaj personoj kaj ankaŭ estas tre grava pordo al la publiko. Dum la pasintaj jaroj la nombro de vizitantoj daŭre kreskis.

En 2017 rekorda nombro da 21.256 personoj vizitis la Esperanto-muzeon, kompare kun la jaro 2016 (15.937) tio estas rimarkinda plialtiĝo de 33 %, kompare kun la jaro 2006 (5.025) eĉ 323 %.

Inter la vizitantoj estas ne nur personoj el Vieno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, precipe gelernantoj kaj gestudentoj, sed ankaŭ multaj turistoj. Same daŭre venas esperantistoj el diversaj partoj de la mondo en la Esperanto-muzeon, kiu – fondita en 1927 – konservas kaj disponigas mondscale la plej ampleksan kolekton pri Esperanto kaj planlingvoj.

Tiu ege pozitiva evoluo baziĝas precipe sur la pliampleksigo de la deĵorhoroj, la enkonduko de novaj laŭaĝaj atelieroj kaj sur eventoj kun specialaj laŭtemaj gvidadoj.



Grupo de infanoj vizitas la muzeon.

Ĉiujare la Esperanto-muzeo – kaj la kvar aliaj muzeoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko – partoprenas plurajn naci- kaj internacikadrajn kulturajn aranĝojn.

Dum la “Longa Nokto de la Muzeoj” kaj la “Tago de la Malfermita Pordo” ni proponas specialajn gvidadojn kaj Esperanto-fulmkursojn. Dum la “Tago de la Monumentoj” kadre de la Eŭropaj Tagoj de kultura heredaĵo ni precipe parolas pri Esperanto kadre de varia speciala temo: 2014 *Illusion* (“Iluzio”), 2015 *Feuer und Flamme* (“Fajro kaj flamo”), 2016 *Gemeinsam unterwegs* (“Kune survoje”), 2017 *Heimat großer Töchter* (“Patrujo de elstaraj filinoj”), 2018 *Schätze teilen* (“Dividi trezorojn”).


Ekzemple en 2017 ni pli koncentris nin pri la elstaraj filinoj ol pri la patrujoj kaj informis pri “Lidja Zamenhof kiel eminenta filino” memorigante pri la 75-a datreveno de ŝia morto.

Por lernejoj klasoj la Aŭstria Nacia Biblioteko ofertas aĝospecifajn programojn, la tiel nomatajn “Wissenswelten” (sciomondoj), pro kiuj dum la pasintaj jaroj pli kaj pli da infanoj kaj gejunuloj ĝuis gvidadojn kaj Esperanto-fulmkursojn.

Ankaŭ grupoj de plenkreskuloj – precipe universitatoj – volonte kaj regule mendas Esperanto-kurson aldone al gvidado.

Tiel ĉiujare inter 40 kaj 50 grupoj ricevas dum 30, 60 aŭ 90 minutoj bazajn konojn pri Esperanto, ili povas efektuple sperti, ke la lingvo bone funkcias, kaj ili ankaŭ ekscias, ke ĝi estas ĉiutage uzata en nia instituto – de dungitoj kaj de vizitantaj esperantistoj.

Krome vizitantoj povas percepti, ke la Esperanto-muzeo estas ne nur muzeo, sed – ekde sia fondo en 1927 – ankaŭ biblioteko kaj arkivo, kiu nuntempe konservas kaj disponigas jenan havaĵon:



Zamenhof-busto en Vieno

- 40.000 faldfolioj
- 35.000 volumoj
- 25.000 gazeteltondaĵoj, precipe el la tempo 1900–1920
- 22.000 fotoj kaj fotonegativoj
- 10.000 manuskriptoj kaj aŭtografoj
- 3.700 diversaj periodaĵoj
- 3.000 muzeaj objektoj
- 1.500 afiŝoj
- 850 aŭd-vidaj materialoj
- 56 antaŭlasaĵoj, postlasaĵoj kaj arkivoj (de asocioj, eldonejoj kaj revuoj)

Se oni konsideras, ke la Esperanto-muzeo disponas pri ekspozicia spaco de nur 80 kvadratmetroj, la statistiko estas elstara: ekde 2005, kiam la nova ekspozicio en Herrengasse 9 estis inaŭgurita, vizitis ĝin pli ol 130.000 personoj, okazis preskaŭ 700 gvidadoj kaj pli ol 350 Esperanto-fulmkursoj (regule nur ekde la jaro 2009), kiujn partoprenis entute pli ol 8.000 personoj.

Pli da informoj troveblas en la retejo de la Kolekto por planlingvoj kaj en la retejo de la Esperanto-muzeo.

Bernhard Tuidar

Tago de la gepatra lingvo

La 21-an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako (Orienta Bangalio), ĉefurbo de la hodiaŭa Bangladeŝo, plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia gepatra lingvo, la bengala, kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo "pli granda", parolata de la fortuloj de tiu momento.

Temas pri io, kio ripetiĝas, en diversaj formoj, daŭre tra la tuta mondo kaj tra la tuta historio, ne nur en Azio, sed ankaŭ en aliaj kontinentoj, kiel en pluraj en pluraj eŭropaj landoj. Tio praktike okazas ĝenerale per la streboj, devigoj, iamaniera altrudo de la uzo de lingvo, plejparte de la angla, fare de iu ekonomia, politika aŭ militismema, ŝtata grandpotenco, por fortigi sian pozicion en la mondo – malfavore al la lokaj gepatraj lingvoj. "Mi

estas la fortulo, vi silentu, aŭ eventuale, se vi volas paroli, vi parolu mian lingvon".

Tiel okazas iom post iom la malapero, morto de lingvoj, kaj tutaj popoloj perdas sian grandan intelektan riĉecon – kiel pri tio atentigas ankaŭ multaj lingvistoj.

Krom la socia maljusteco kaj psikologiaj problemoj rezultantaj el la perdo de uzeblo de sia gepatra lingvo, kaj pro nesufiĉa sperto en la uzo de la altrudata lingvo, necesas konscii ankaŭ pri aliaj faktoj: la biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj, interkonektitaj kaj dependantaj unu de la alia. El perdo de lingva diverseco rezultas perdo de tradiciaj konoj esence necesaj por daŭripova biodiverseco, por la vivo.

Je la 17-a de novembro 1999 Unesko proklamis la 21-an de februaro la *Internacia Tago de la Gepatra Lingvo*. En 2007 ankaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj alvokis la membroŝtatojn por “Antaŭenpuŝi la konservadon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj uzataj de la popoloj de la mondo”, samtempe deklarante la jaron 2008 *Internacia Jaro de Lingvoj*.

En 2014 Unesko aperigis en sia retejo ankaŭ Esperanto-lingvan version de la mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro, Irina Bokova.

Kiel rilatas al ĉio ĉi *Esperanto*? La kernaj valoroj de ĉi tiu tago, la diverseco kaj la rajto de ĉiu homo paroli sian gepatran lingvon, estas ankaŭ la valoroj, kiujn la tutmonda movado por Esperanto defendas. Ni, la esperantistoj, volas neniun lingvon malaperigi, ni volas, ke ĉiuj lingvoj plu ekzistu, en respekto de ĉies lingvaj rajtoj, kaj regu lingva justeco en la interkomunikado. Ĉi-cele, de multaj jaroj, *Universala Esperanto-Asocio (UEA)* solene kunfestas ĉi tiun tagon, interalie por substreki, ke la internacia lingvo Esperanto ne estas eliminanto de lingvoj, kia estas lingvo de granda ekonomia kaj militista potenco.



Ŝahid Minar, aŭ la Martira Monumento, en Bangladeŝo, memorigas la viktimojn de la 21-a de februaro 1952.



Esperanto fakte estas protektilo kontraŭ la malapero de lingvoj, kiel diris s-ino Vigdís FINNBOGADÓTTIR (prezidento de la Respubliko Islando inter 1980-1996): “*Estas jam tempo ke la diversaj nacioj komprenu, ke neŭtrala lingvo povus iĝi vera remparo por iliaj kulturoj kontraŭ la monopolema influo de nur unu aŭ du lingvoj, kiel hodiaŭ tio pli kaj pli evidentiĝas. Mi sincere esperas, ke Esperanto rapide progresos por helpi ĉiujn naciojn de la mondo.*”

Eble iu ankoraŭ demandas: "Kial ĝuste Esperanto?". La kialo estas simpla. Malantaŭ Esperanto ne estas ŝtatoj, ekonomiaj interesoj, imperiismaj strebadoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj, ties lingvoj, aŭ akiro de iliaj merkatoj. Malantaŭ Esperanto estas nur bonvolaj homoj el plej diversaj popoloj, nacioj, kiuj celas justecon por ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj lingvoj, en paco inter ĉiuj popoloj.

“Plifortigi la rajtojn de la parolantoj de ĉiu lingvo estas la celo, al kiu esence kontribuas Esperanto.” (Prof. Robert Phillipson).

Esperanto estas ilo akcelanta atingon de justa komunikado kaj tiel de justaj rilatoj inter etnoj, kulturoj, popoloj.

“... Mi esperas, ke Esperanto daŭrigos la plenumadon de tiu duflanka rolo subtenante diversecon kaj kreante unuecon.”
(Rita Izsák-Ndiaye, Speciala Raportisto de UN.)



Sekve, la uzo de la ponto-lingvo Esperanto en internacia komunikado realigas lingvan egalrajtecon kaj helpas ĉiujn pluvivigi sian lingvon. Ĉi tiu estas la klara mesaĝo, kiun esperanto-parolantoj el la tuta mondo volas sendi al ĉiuj tutmonde la 21-an de februaro.

Informa Fakto de UEA

La “sekreta malvirto” de Tolkien

La fama Brita aŭtoro J.R.R. Tolkien (1892–1973) havis “sekretan malvirton” kiu ĉesis esti sekreta en 1936, kiam li aperigis eseon ĝuste tiel titolitan: *A secret vice*. Ĝi estis ofte represita.



Lia malvirto estis inventadi lingvojn. Jam tre junaĝe Tolkien lude kreis kun siaj kuzinoj sekretajn lingvojn, kiel faras multaj infanoj; sed dum liaj kuzinoj estis normalaj infanoj kaj ĉesis interesiĝi, li daŭrigis. Lernado de la Franca kaj de Latino en la lernejo nur plifortigis la ‘malvirton’, kaj tiutempe li eklernis ankaŭ Esperanton. 17-jara li uzis ĝin por 16-paĝa manuskripto skribita en “privata skolta kodo”, do iel duoble ĉifrita.


Tolkien havis tute aliajn celojn kreante siajn lingvojn ol Zamenhof. La lingvoj inventitaj de Tolkien estas parolataj en inventitaj mondoj kaj sekve povas havi longajn, inventitajn historiojn, komplekseajn gramatikojn kaj multajn dialektojn. Ili estas parolataj de ne vere homaj estaĵoj kaj ĉiu havas sian unikan skribsistemon. Li volis ilin belaj, ne facilaj. La vortoj devis iel harmonii kun siaj signifoj kaj ne devis simili al vortoj en konataj lingvoj (kvankam kelkfoje evidentiĝas ke li studis la Finnan kaj la Kimran – unu, Sindarin, eĉ estas gramatike bazita sur la Kimra).



Diverslingvaj priskriboj de kelkaj el la Tolkien-aj lingvoj

Tio tamen neniel signifas ke al Tolkien malplaĉis Esperanto. En *A secret vice* li skribis: “Mi ŝatas ankaŭ precipe Esperanton, nelaste ĉar ĝi origine estas kreitaĵo de unu sola homo, ne lingvisto, kaj do iusence homa lingvo senigita pri la malkonvenaĵoj kaŭzitaĵ de troo da kuiristoj”. Jam en 1930 li estis petita fariĝi honora konsultisto al la Brita Esperanto-Asocio, kaj en sia akcepta letero (presita en 1932) li skribis interalie unu ofte citotan frazon: “Mia konsilo al ĉiuj, kiuj havas la tempon aŭ inklinon okupiĝi pri la movado de internacia lingvo, estus la jena: ‘Subtenu Esperanton lojale’.” Tio ankaŭ estas aludo al Ido kaj aliaj projektoj, kiuj tiutempe ankoraŭ iomete rolis en la publika imago.

Post la dua mondmilito la Esperantomovado urĝe bezonis pruvi sian seriozecon, do oni tenis iom da respekta distanco al la lingvokreema Tolkien. Certe ankaŭ ne helpis ke Tolkien, estante politike iom naiva Katoliko, subtenis Franco en la Hispana civila milito, ĉar partoj de la kontraŭa flanko povis esti sufiĉe kruela al eklezianoj.



Ĝenerale, tamen, Tolkien ne tenis tiel strangajn aŭ ŝokajn vidpunktojn ke ne pardonus ilin paso de kelka tempo. En 1997 aperis Esperanta versio de lia tri-voluma *La mastro de l' ringoj*. Tradukis ĝin William Auld, kiu kunlabore kun Christopher Gledhill tradukis ankaŭ *La hobito: aŭ tien kaj reen*, eldonita en 2000. Ĉi tiu artikolo estas bazita sur studo pri Tolkien, gastigata ĉe la retejo de la Brita nacia biblioteko, kies aŭtoro (la konata itala Esperantisto Renato Corsetti) eĉ suplementas la Tolkien-an “Subtenu Esperanton lojale” per “Ĝuu Sindarin plene”.

Raporto el Japanio


Antaŭlasta konservejo de nuklaj poluitaĵoj

La 28-an de oktobro oni komencis konservi nukleajn poluitaĵojn en la antaŭlasta (eble la lasta kaj eterna) konservejo konstruita en la urboj Ookuma kaj Futaba, kie estas la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima.

En la fundo de la konservejo estas sternitaj kontraŭakvaj tolaĵoj por ke poluitaĵoj ne poluu la subteran akvon. Desube kolektotan pluvakvon oni purigos per maŝino kaj forfluigos en riverojn. Tiu konservejo havas 16 000 hektarojn da tereno, sed tio estas nur 39% de la planita tereno. Estas malfacile akiri konsenton de la terposedantoj.

Sur tiu tereno poste oni konstruigos bruligejon de sarkitaj herboj kaj hakitaj arboj kaj konservejon de forte radioaktiva cindro. La registaro promesis laŭ la leĝo, ke post 30 jaroj (antaŭ 2045) tiu konservejo translokiĝu ekster la gubernion Fukuŝima, sed certe neniu kredas tion, ĉar neniu akceptos tiujn danĝerajn instalaĵojn en sian lokon.

En Fukuŝima troviĝas 15,2 milionoj da kubaj metroj da poluita tero en provizoraj konservejoj, sportejoj, parkejoj kaj eĉ en ĝardenoj de loĝantoj. Laŭ la plano plejparto de tiuj poluita tero estos transportita en tiun konservejon antaŭ 2020.



Juĝejoj favoras al la suferantoj

En 2017 okazis 3 verdiktoj pri la sufero de la nuklea akcidento. La 17-an de marto la juĝejo Maebaŝi (gubernio Gunma), la 22-an de septembro la juĝejo Ĉiba (gubernio Ĉiba) kaj la 10-an de oktobro la juĝejo Fukuŝima verdiktis.



En Fukiŝima 3800 homoj akuzas la ŝtaton kaj TEPCO-n. La 10-an de oktobro mil homoj kolektiĝis antaŭ la juĝejo Fukuŝima. Kiam ĝi verdiktis favore al ili, ili ĝojkriis. La ĝenerala sekretario de la akuzantaro deklaris: “TEPCO funkciigis nebone tenatajn reaktorojn kaj okazigis la akcidentegon. Ĝi estas atencinto. La ŝtato kaj TEPCO duope provis kaŝi sian kulpon. Tion la juĝejo malkaŝigis.”

	Fukuŝima	Ĉiba	Maebaŝi
Ĉu la ŝtato kaj TEPCO povis antaŭvidi tiun grandegan cunamon?	Laŭ la prognozo de la ŝtata komitato pri tertremoj raportita en julio 2002 ili povis antaŭvidi la cunamon. 😊	Laŭ la ŝtata komitato ili povis antaŭvidi la cunamon antaŭ 2006. 😊	Post la raporto de la komitato ili povis antaŭvidi la cunamon. 😊
Ĉu ili povis preventi la akcidenton?	Ili povis preventi la akcidenton. 😊	Ili ne povus preventi la akcidenton, eĉ se ili prenus rimedojn. 😞	Ili povis preventi la akcidenton. 😊
Ĉu la ŝtato havis rajton ordoni al TEPCO kontraŭcunaman rimedon?	Jes. 😊	Jes. 😊	Jes. 😊
Ĉu la ŝtato havas respondecon pri la akcidento?	Jes. Ĝi neglektis ordoni kontraŭinundajn rimedojn. 😊	Eĉ se ĝi ne uzis tiun rajton, tio ne estas nepermesbla. 😞	Se ĝi uzus tiun rajton, la akcidento estus preventita. 😊
Ĉu sufiĉas la ĝisnuna kompenso?	La registara regulo estas unu normo. Pli da kompenso povos esti pagata. 😞	Kontraŭ la perdo de hejmloko kompenso estu pagata. 😊	Pli da kompenso por sufero estu pagata. 😊

El tiuj tri juĝadoj, tiu de Maebaŝi estis preskaŭ venko kaj tiu de Fukuŝima estis perfekta venko por la akuzantoj. En tiuj du pli da kompensa mono estis aprobita, sed la sumo estis tro malgranda. En Maebaŝi 39 milionoj da enoj por 62 akuzantoj (averaĝe po 630 000 enoj por unu akuzanto) kaj en Fukuŝima 500 milionoj da enoj por 2907 akuzantoj (averaĝe po 172 400 por unu). La verdikto de Ĉiba ne estis tiel bonaj, ĉar ĝi ne aprobis kulpon de la ŝtato, sed ĝi aprobis kompensan monon kontraŭ perdo de vivbazo en hejmloko por la suferantoj, kaj ĝi aprobis 376 milionojn da enoj por 42 akuzantoj kiel kompensan monon (averaĝe po 9 milionojn por unu).

La juĝantaro en Fukuŝima klarigis pri antaŭvidebleco de la cunamo jene:

“La ŝtata komitato pri okazontaj tertremoj raportis en julio 2002, ke laŭ la pacifika marbordo de la insulo Honŝuu povos okazi grandaj tertremoj, kiuj povos kaŭzi grandajn cunamojn je la probableco de 20% en la venontaj 30 jaroj. Se la ŝtato tuj studus la raporton, ĝi povus antaŭvidi la 15,7-metran cunamon, kiu atingos la reaktorojn. Se la ŝtato tiutempe ordonus al TEPCO kontraŭrimedon por tio, la akcidento estus evitota. La ŝtato neglektis tion, tial ĝi estas kritikenda.”

13 reaktoroj malkonstruataj

La 22-an de decembro Kansaja Elektra Kompanio publikigis, ke ĝi decidis malkonstrui du reaktorojn en la nuklea centralo Ooi en la gubernio Fukui. Post la nuklea akcidento en Fukuŝima la regularo por bonteni la reaktorojn fariĝis pli severa, tial malgrandaj reaktoroj, por kies riparo kaj plibonigo oni devas elspezi pli multe, ne estos profitaj. Tamen tiuj du estas grandkapablaj, povonte produkti 117,5 kilovatojn da elektro (plejparto de aliaj forĵetataj reaktoroj produktis pli-malpli 50 kilovatojn), tial ŝajnis, ke ili estas profitaj. Tiu decido signifas, ke reaktoroj nun fariĝas ne profitaj. Komenciĝis erao de malkonstruado de reaktoroj, sed efektivigi tion estas tre malfacile por la elektraj kompanioj.

La plej granda malfacilo estas kie deponi la nukleajn rubaĵojn. Tiuj rubaĵoj estas klasifikitaj en tri nivelojn, kaj ĉiuj estos enterigitaj. La plej danĝeraj rubaĵoj estos enterigitaj pli ol 70 metrojn profunde dum la venontaj 100 mil jaroj. El la malkonstruataj kaj malkonstruotaj 9 reaktoroj ekestos 80 mil tunoj da tiaj rubaĵoj, sed oni ankoraŭ neniam enterigis ilin. Nur la elektrokompanio Genden prezentis planon, ke ĝi enterigos rubaĵojn en la truegon 100 metrojn longan, 80 metrojn larĝan kaj 4 metrojn

profundan en sia tereno, sed la Nuklea Reguligada Aŭtoritato ankoraŭ studas pri la plano, kaj la gubernio ne aprobis ĝin.

La registaro decidis, ke rubaĵoj poluitaj je malpli ol 0,01 milisiverto jare estu reuzataj, sed ĝis nun nur malmultaj estis reuzitaj en la tereno de elektraj kompanioj, kaj ekstere neniam.

Por komplete malkonstrui reaktoron, oni bezonas pli ol 30 jarojn. Dum la komencaj 5~10 jaroj oni ekzamenos la instalaĵojn kaj purigos ilin, dum la postaj 8~10 jaroj oni malmuntos ne tiel poluitajn instalaĵojn, kaj dum la postaj 6~9 jaroj oni malmuntos la reaktoron kaj fine dum 4~8 jaroj oni malmuntos ĉiujn instalaĵojn kaj la tereno estos pura. El tiuj laboroj la plej malfacila estas la malmuntado de la reaktoro, ĉar ĝi estas tiel dense poluita, ke homoj ne povas labori tie, do anstataŭe robotoj laboras/os, sed por tio oni bezonos tre altan teknikon.

En ĵurnaloj oni klarigas la malfacilojn kiel supre, sed mi havas kroman timon. Tio estos manko de laborforto. Homoj ne volas labori en tiu danĝera loko, ĉiam elmetiĝante al radioaktiveco. Laŭ leĝo homoj, kiuj jam elmetiĝis al pli ol 100 milisivertoj dum 5 jaroj, ne plu povas labori en nuklea centralo, do la kompanio devas dungi pli kaj pli da novaj, senspertaj laboristoj. Nun ĝenerale en Japanio mankas laborforto. Multaj kompanioj dependas de aziaj eksterlandanoj.

Jam nur en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima laboras 10 mil homoj ĉiun tagon. Por malkonstrui 11 reaktorojn, oni bezonos minimume 100 mil laboristojn ĉiun tagon kaj devos dungi pli da novaj laboristoj ĉiun jaron. Ĉu sufiĉos laborforto por tio? Ĉu sufiĉos bonkvalita laborforto por tio? Ĉu la elektraj kompanioj povos elspezi tiom da mono? Ĉu la japana ekonomia forto daŭros tiel longe? Dume ĉu ne okazos aliaj kataklismoj?

La juĝejo Hiroŝimo malpermesis funkciadon de la reaktoro en la nuklea centralo Ikata

La 13-an de decembro la apelacia juĝejo Hiroŝimo verdiktis, ke la reaktoro n-ro 3 de la nuklea centralo Ikata en la insulo Ŝikoku ne funkciu pro danĝero de ebla grandega erupcio de la monto Aso en la insulo Kjuuŝuu. Tiu reaktoro nun estas ekzamenata kaj oni planas ekfunkciigi ĝin en januaro 2018, sed tio povos montriĝi nefarebla. La unuan fojon en la apelaci-juĝeja nivelo la kontraŭnuklea flanko venkis. Tio estas tre granda por ni.



Alia menciinda afero pri tiu ĉi verdikto estas, ke la juĝejo malpermesis la funkciadon surbaze de la regularo de la Nuklea Reguligada Aŭtoritato. Tiu aŭtoritato aprobis refunkciigon de la reaktoro, taksante la danĝeron de granda erupcio de la monto Aso ignoreble malgranda, sed la juĝejo verdiktis, ke ekzistas danĝero al homa vivo pro la risko de grandega erupcio de la vulkano Aso 130 kilometrojn for de la nuklea centralo Ikata.

Ĝis nun en juĝejoj la ĉefa debato temis pri tertremoj, sed en tiu ĉi juĝejo temis pri vulkanoj kaj erupcioj, kaj la juĝejo verdiktis, ke laŭ la regularo decidita de la Aŭtoritato oni devas pli severe taksi la staton kaj danĝeron de vulkanoj. Japanio estas vulkana insularo, do ĉie estas danĝeraj vulkanoj. Dank'al tiu ĉi verdikto, la kontraŭnuklea flanko akiris novan armilon por batali kontraŭ la registaro kaj la elektraj kompanioj.

En la nuklea centralo Ikata troviĝas tri reaktoroj. La kompanio jam decidis forigi la reaktoron n-ro 1, pri la reaktoro n-ro 2 ankoraŭ ne decidis kion fari, kaj ĉi-foje la juĝejo malpermesis la funkciadon de la reaktoro n-ro 3. Nuklea politiko havas pli kaj pli da malfavora situacio, sed ankoraŭ la registaro kaj la industria mondo kroĉiĝas al nukleo.

HORI Jasuo

Eventoplana jaro

Skribas la vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill:

Multajn dankojn de Stefan al tri kontinentoj!

Komence de la nova jaro, mi volas rememori miajn belajn kaj aventuretajn spertojn el la eventoplana jaro 2017. Por mi tiu jaro ekde marto portis multajn vojaĝojn, jarkomence mi devis kontraŭ tumultaj obstakloj krei tri sinsekvajn numerojn de revuo Esperanto, por revenigi ĝin al akurateco. Mi spertis ankaŭ grandegajn ŝanĝojn en Hungario, kie en julio mi forlasis mian loĝejon/Esperanto-oficejon de 15 jaroj, kaj en septembro ekloĝis en nova domo kun ĝardeno en alia parto de Budapeŝto, kune kun du el miaj tri filinoj.



Januare: Kvar tagojn de la nova jaro mi pasigis en Tanzanio, lando, kiu ege plaĉis al mi. Mi volas danki al Francis pro la bonkora akcepto en Dar-es-Salaam, al la esperantistoj, kiuj min prizorgis en Mwanza, poste al la realigantoj de la memorinda 6-a Afrika Kongreso de Esperanto en Bunda, kiu povis enhavi la 29-an AMO-seminarion, kaj al Mramba Simba pro la neforgesebla vizito al Marambeka kaj la Esperanto-lernejo tie.

Februare: Dankon pro la akcepto en Poznano, Pollando, okaze de mia rapida vizito al la februara sesio de la universitataj studoj, kiu entenis alt-nivelan simpozion, lige kun projekto de UEA kaj ILEI: 'Jaro de la Lernanto'



Marte: Mi volas danki al la esperantistoj en Kartvelio, kiuj kune organizis la 10-an Mezoriantan Kunvenon (MK) en Kutaisi, kie ni povis samtempe okazigi la 31-an seminarion pri AMO (vidu la foton). Unuavide mi dankas al s-ino Nana Ĥizambareli, kiu ebligis al mi ankaŭ konatiĝi kun Tblisi kaj plie la agantojn en MONA.

Aprile: Mi volas danki al la konsiderinde granda kaj aktiva Esperanto-grupo en Erevano, Armenio, kies anoj kune belege organizis la post-kongreson de la 10-a MK. Inter la ekskursoj kaj kulturaj vizitoj restis tempo por kelkaj prelegoj, interalie pri la Jaro de la Lernanto. Mi dankas specife al s-ino Karine Arakelian kaj ŝia organiza teamo.

Neforgeseblaj spertoj ĉe la antikvaj monaĥejoj kaj bonvenigaj gastejoj, ĉiam kun Monto Ararat fone. Plenega monato. Semajnon post reveno el Azio, pluen al Greziljono por la 33-a AMO-seminario, kunlabore kun ILEI. Dankon al la organiza teamo de la Kulturcentro! Pluen trajne por la ĉiujara estrarkunsido de UEA – dankon al la CO kaj miaj estraraj kolegoj.

Maje: La monato de trajna odiseo; la uzo de sep-taga bileto Interrail pruviĝis la plej ekonomia maniero kovri la kunsidojn en Vroclavo, Pollando, kie mi dankas al Małgosia Komarnicka kaj la organizantoj de la maja renkontiĝo kun la enkonstruita 34-a AMO-seminario, internaciigita per la partopreno de grupo el Bretonio. Poste tra Prago (dankon al Vlasta kaj familio) kaj Innsbruck ĝis Les Brenets por la solstara AMO 35 internaciigita per la partopreno de grupo el Danio.

Junie: La ĉiujara vizito al Subotica por la Tutmonda Ekzamena Tago. Mi dankas al Aranka Laslo pro la ĉiama bonvenigo, kaj al Radojica Petrovic kaj Djorge Dragolovic pri diskutoj pri la reaktivigo de Skolta Esperanto-Ligo.

Julie: Dankon al ILEI kaj la LKK pro modele realigita 50-a Kongreso de ILEI en Busano (la maldekstra foto), same al la organizantoj de la 102-a UK en Seŭlo. (la dekstra foto). Ankaŭ al Tagiĝo kaj Brila pro belega prizorgo komence kaj fine de mia restado en Koreio.



Aŭguste: Loĝigo en Budapeŝto en dumtempejo inter du loĝejoj.

Septembre: Ekloĝo en mia nova adreso en la 20-a de la monato, kie ekde tiam mi vivas kun miaj du filinoj Karina Melinda kaj Sonja Dora.

Oktobre: Grandioza vojaĝo al Barato (Hinda Unio), kun ege agrabla gastigo en Bengaluru de Giridhar kaj Reka Rao, kun la eblo viziti la Universitaton Azim Premji, kie okazas Esperanta instruado kun klubo vivo. Ĉio tio okazis antaŭ la 4-a SudAzia Seminario, kune kun la 39-a AMO-seminario. Tiu aranĝo ĝuis grandan sukceson, nelaste pro la alveno de granda delegacio el Nepalo. Mi ege ĝojis renkonti la homojn, kuj kredible formos la kernon de la revivigo de la Esperanto-movado en tiu enorma



BRICS-lando. Dankegon al ĉiu, kiu igis tiun viziton memorinda, promesplena, kaj por mi persone, ege agrabla.




Decembre: Tre interesa vizito al Parizo por la festa kunsido en la sidejo de Unesko de la kulmino de la Zamenhof-jaro, kiu altiris ĉ. 150 personojn. Kun AMO 41 antaŭ la evento, kaj pozitiva kunsido kun la ĉefredaktoro de la Unesko-kuriero en la posta tago. Dankon al François kaj Natalie, kaj la tuta konsiderinda organiza teamo malantaŭ tiu sukceso.

La maldekstra foto: la publiko kun Unesko-kurieroj, videblas dekstre s-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof. La Unesko-sidejo estas kvazaŭ Universala Kongreso – ĉiam ajn eblas renkonti delegitojn el la tuta mondo – la ĉefa diferenco – la afrikaj delegitoj sukcesas akiri vizojn. En la dekstra foto: esperantistoj kun la delegitaro el Niĝerio.



Agrablan jaron 2018, kaj refoje dankon al ĉiu, kiu helpis al mi (kaj per tio al UEA) trapasi tiun ege eventoplenan jaron 2017!

Saussure-a jubileo



Samtempa karikaturo
poŝtkarto

Antaŭ 150 jaroj, la 17-an de marto 1868, naskiĝis René de Saussure en Ĝenevo. Post studado de lingvistiko kaj matematiko li skribis sian plej gravan verkon *Fundamentaj Reguloj de la Vort-teorio en Esperanto*. Li estis frato de la tre fama lingvisto *Ferdinand de Saussure*.

Sed René havis ankaŭ aliajn interesojn rilate al Esperanto. En 1907 li publikigis sian projekton de universala monsystemo, kiun li nomis **Spesmilo** (kun speciala simbolo: **S**) el la franca vorto *espèce*. 1 Spesmilo (Sm) = 10 Spescentoj (Sc) = 100 Spesdekoj (Sd) = 1000 Spesoj. Tiu mono efektive estis uzata kiel intervaluta kalkul-unuo de kelkaj britaj kaj svisaj bankoj. Ĝi estis uzata ankaŭ de Ĉekbanko Esperantista, fondita en 1907.

La valoro de Spesmilo estis la sama kiel 0,733 g da pura oro. Ĉar aliaj monistemoj estis ligitaj al la oro, oni povis facile kalkuli: 1 Sm = 2 britaj Ŝilingoj = 1 rusa Rublo = 0,5 usona Dolaro = 2,5 svisaj aŭ francaj Frankoj = 2,5 hispanaj Pesetoj.

La 1- kaj 2-Spessimilaj moneroj estis kaj estas ŝatataj kolektaĵoj kaj rapide malaperis el la cirkulado. Ekde 1919 Spesmilo havas nur numismatikan valoron. Nuntempe Spesmilo estas la nomo de internacia investa firmao kun la sidejo en Londono: www.spesmilo.com.



En 1942 estis fondita Universala Ligo en Nederlando. Tiu mondfedera organizo aktivis por internacia kompreniĝo kaj universala monsystemo. La nomo de tiu mono estas **Stelo**. En 1960 estis pregitaj moneroj de 1, 5 kaj 10 Steloj. Sur la moneroj aperas la jaro 1959. En 1965 sekvis tri variantoj kun la valoro 25 Steloj. Ankaŭ papera mono en la formo de kuponoj ekzistis.

La Stelon oni ĝenerale uzis por transpigi malgrandajn sumojn. Ankaŭ tiuj moneroj kaj kuponoj estas hodiaŭ tre ŝatataj de kolektistoj.

En 2012 Albert Boon fondis la Esperanto-Numismatikan Asocion en Belgio. Oni povas senpage membriĝi (sufiĉas reta mesaĝo al la fondinto bert.boon@skynet.be), kaj la membroj ricevas kvarfoje en la jaro la gazeton “Esperanta Numismatiko” senpage.



De 2012 oni ankaŭ uzas interne de iuj junularaj kunvenoj plastajn monerojn (ruĝajn, flavajn kaj verdajn) kun la valoroj de unu, tri kaj dek Steloj. La aktualan kurzon (1 Spesmilo = ĉ. 4 Eŭroj) oni povas kontroli ĉe:



<https://www.facebook.com/pg/plastamono/posts/>.

Okaze de la 150a datreveno de René de Saussure la 17an de marto 2018 estis publikigita medalo en la formo de 100-Stela monero. Ĝi konsistas el unu unco (31,1 g) da pura arĝento 999/1000. La diametro estas 37 mm. La produktinto estas *Münze Österreich AG* (Monerfarejo Aŭstria Akcia Kompanio). *Münze Österreich* estas 100%-e filia kompanio de la Aŭstria Nacia Banko.



Dezajnis la moneron Mag. Walter Klag kaj Mag. Helmut Andexlinger, ekde 2016 la ĉefgravuristo de *Münze Österreich*. En la aŭstria urbo Steyr li sukcese trapasis la gravuristan edukadon. Poste li studis komunikadosciencon en la Viena Universitato. Unu el liaj plej grandaj sukcesoj estis en 2012, kiam li dezajnis la 2-Eŭran moneron, kiu cirkulas en 17 landoj. Li gajnis en konkurso kontraŭ 800 aliaj konkursantoj.

[Laŭ informoj de Walter Klag kaj Rogier Huurman]



Kio okazas kiam oni kombinas Polinon kaj Bosnianon en Kopenhago: NOVA FAMILIO.

Kio okazas kiam oni kombinas sin por eltiri obstinan karoton: MEMBROFALO.



Kio okazas kiam oni kombinas Zamenhofan feston kun Duolingo: DU NOVAJ MEMBROJ.

(Fotoj el la Zamenhofa festo de KEK)